

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Antoni Grabowski

kun ok-liniaj strofoj

Jen floras sola, forlasita
La lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro,
Velkinte kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca,
Nek roz-burĝono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn
Aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,
Ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas,
Do iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable
Disŝetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma,
Malviva kunular' ĝardenala!

Mi tiel sekvu, kiam pasos
De l' amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo
Elfalos lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj,
Sentemaj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi
Solece en malvarma rondo?

...

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Clarence Bicknell

kun ok-liniaj strofoj

Jen la lasta rozeto
de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj
jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco,
ne unu rozflor'
Partoprenas komplete
en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki
tutsola, ho roz'.
Iru dormi kun ili
en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn
disŝetas mi for
Al viaj kunuloj
sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte
formortus mi mem,
Se ne plu min atendus
amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro
en tiu ĉi mond'
Volus loĝi izola
sen amo-respond'?

...

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-531-1059 (2010-03-28 21:24:14)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (*1842-10-27 – †1918-07-17).*

Arg-531-1060 (2014-02-15 14:00:59)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell.